


Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Prelego por la Viena Zamenhof-festo 15.12.2013
en la Pola Instituto, Am Gestad 7, Vieno*

Josef Cink


Miroslav Malovec

Estimataj samideanoj,



hodiaŭ mi volas prezenti al vi eminentan ĉeĥan esperantiston, kiu forpasis antaŭ unu jaro postlasinte ampleksan verkaron. Li nomiĝis Josef Cink kaj sur la unua bildo vi vidas lin, maldekstre dum junaj jaroj komune kun alia fama ĉeĥa esperantisto Jan Werner, dekstre kiel maturan viron.

Li vivis en la regiono proksima al la pola landlimo. Li naskiĝis en la vilaĝeto Chudoba (kio signifas Malriĉeco, la 29-an de junio 1933. La vilaĝeto estas parto de pli granda vilaĝo Horní Heřmanice, kie li vizitadis la elementan lernejon ĝis la fino de la dua mondmilito. Poste li vizitadis gimnazion en la proksima urbo Lanškroun kaj loĝis kun la gepatroj en la urbeto Albrechtice. Vi povas vidi, ke ĉiuj tiuj lokoj




estas proksime unu de la alia, same kiel Herbortice, kie okazis katolikaj Esperanto-tendaroj, nuligitaj de komunistoj. Inter la jaroj 1952-1956 li studis en Brno ĉe Masaryk-universitato ĉe la naturscienca fakultato kaj siajn studojn finis kiel magistro de pedagogio kun rajto instrui biologion, geologion kaj geografion en mezlernejoj. El Brno li revenis al sia regiono, sed ricevis instruistan postenon en vilaĝo Červená Voda (tio signifas Ruĝa Akvo) iom norde de Horní Heřmanice.

Tie li en 1961 edziĝis al loka instruistino kaj havis kun ŝi tri filojn. Dum kelkaj jaroj li instruis en la vilaĝoj Králíky kaj Kostelec na Ohři kaj kompletigis sian edukigon ankoraŭ ĉe Stenografia Instituto en Prago, fakoj adminstrado kaj ekonomio.

Sed nin precipe interesas lia esperantista vivo. Kiel katoliko li legis gazeton *Anděl strážný* (Gardanĝelo) kaj tie li trovis en 1948, en sia 15-a jaro, artikolon pri Esperanto kaj aliĝia al koresponda kurso de fratoj Jan kaj Karel Filip, pastroj bone konataj inter ĉeĥaj esperantistoj. Jam kiel knaboj ili verkis grandan Esperantan-ĉeĥan kaj ĉeĥan-esperantan vortaron, en matureco kantareton kaj du originalajn teatraĵojn, Fino de la mondo kaj La Turo inter Nuboj. En tiu kurso Josef Cink akiris nur pasivan scion, tial li partoprenis someran Esperanto-kurson en Rožnov pod Radhoštěm. En 1951 li submetiĝis al la asocia ekzameno „pri scio“ kaj en 1952 „pri kapablo instru“. Tiam li jam membris en Esperanto-klubo en Lanškroun kaj en la tutlanda asocio, kiu bedaŭrinde 1952 estis likvidita.

En la sama jaro 1952 li komencis studi en Brno kaj fariĝis membro de la kluba junularo, kiu preparis por la klubo plurajn teatrajn spektaklojn, kvankam nur en modesta kluba medio. Konservigis nemultaj fotoj de tiu tempo, sur du estas videbla ankaŭ juna Josef Cink.

Kiam en 1969 la tutlanda asocio estis renovigita, li tuj fariĝis ĝia membro jam kiel konata persono inter ĉefaj esperantistoj. En la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj li kompilis junulajan kantaretojn, en kiuj li prezentis sin kiel tradukanto de poezio, kvankam ne ĉiuj kantoj estis de li tradukitaj. Kiel pedagogo li fariĝis membro de la pedagogia sekcio kaj de ĝia ekzamena fako. Tiam ekzistis populara lernolibro por komencantoj de Theodor Kilian, aperinta jam en pluraj eldonoj, Josef Cink verkis ĝian daŭrigon por progresintoj. Ĉar la libro de Kilian havis verdan stelon, la libro de Cink devis havi la saman, sed iu en la presejo pro eraro presis bluan. La asocio estis komence ŝokita kaj volis la eraron reklamaci, sed poste la komitato ŝanĝis sian opinion, ĉar ambaŭ libroj estis almenaŭ pli facile distingeblaj unu de la alia. Post falo de komunismo la oficiala eldonejo ne plu volis eldoni esperantlingvan lernolibron, sed permesis, ke la asocio mem eldonu presitaĵon. Nur la titolo paĝo estis malpli luksa.



Plej multan famon Josef Cink akiris per sia koresponda kurso, kies unua eldono aperis en 1980 kaj dua 1989. Tiam estis Esperanto sufiĉe populara, dum la jubilea jaro 1987 mi mem havis 150 korespondajn kursanojn. Ni sukcesis la kurson enkomputiligi, Josef Cink ĝin iomete modernigis kaj la asocio ĝin uzas ĝis nun, kvankam kursanoj estas tre malmultaj kaj konkurencas al ĝi kurso de Stano Marček. Ni enkomputiligis ankaŭ lian lernolibron kun la blua stelo kaj uzas ĝin kiel korespondan kurson por progresintoj.

Post la revolucio li pensiigis kaj ĉesis vizitadi Esperanto-aranĝojn, ĉar el lia vilaĝo Červená Voda estis malbona trajnkonekto. Li kontribuis ĉefe por la katolika gazeto Dio Benu. Al mia Starto li sendis 20-partan artikolon pri enigmoj kaj rebusoj. En ĉiu daŭrigo estis klarigitaj du diversaj enigmoj. Por la katolika sekcio li esperantigadis diversajn spiritajn kantojn, ankaŭ plurajn operojn por infanoj. Por sia vilaĝo li verkis ĉeflingve libron Červená Voda kaj ĉirkaŭaĵo, kiu estis lia lasta eldonita libro.

Laŭ propono de inĝ. Jan Werner ni komencis kolekti informojn pri aktivaj esperantistoj por tiel nomata Memoro pri la Ĉeĥa Esperanto-Movado. Ni petis ankaŭ Jozefon Cink, ke li plenigu nian enketilon. Li priskribis siajn laborojn, kiujn li faras, kaj tiujn efektive Jan Werner trovis post lia morto, kiam li vizitis la vidvinon. Ŝi konfidis al li la manuskriptojn de la mortinta edzo kaj Jan Werner sentas sia devo prilabori ilin kaj laŭ eble publikigi. Eble la plej grava verko estis ĉeĥa-esperanta frazeologio, pli ol 300-paĝa libro. Jan Werner ĝin preparis por preso, du reviziantoj ĝin jam legis, mi estas la tria. Ankoraŭ mi devas kontroli kvindek paĝojn kaj post la nova jaro nia klubo ĝin eldonos.



Por tiu kontrolo mi havas je dispono similajn verkojn, kiel *Proverbaro* de Zamenhof, *Parolturnaro*, *Kiel diri* kaj precipe



6000 frazeologiaj esprimoj de Ada Csizsár kaj Kalmán Kalocsay. La verko de Cink havas proksimume duoblon. Mi konas ankoraŭ aliajn konversaciojn, kie troviĝas ordinaraj frazoj kiel „bonan tagon, kia estas via nomo, kie troviĝas la stacidomo“ ktp. Sed la verko de Cink ne estas tia. Li elektis nur malfacile tradukeblajn metaforojn kaj slangajojn kun poezia forto. Laŭ modelo de la *Proverbaro* li ŝatas tiujn esprimojn rimigi, kvankaŭ ne ĉiam.

Multajn metaforojn oni povus traduki per normalaj vortoj, ekzemple la Zamenhofan „Ĝi estas por mi ĥina scienco“ eblas esprimi simple „mi ne komprenas ĝin“, sed tia traduko perdus ĉian poezion, kiu estas propra al

metafora esprimado. Ĝi estus klarigo, sed ne adekvata traduko. Tian simpligitan vortigon Josef Cink evitas kaj ĉiam serĉas fortan poezian bildigon, kiu estus internacie komprenebla ankaŭ al personoj, kiuj aŭdas aŭ vidas la esprimon la unuan fojon. Frazeologiaĵoj kutime esprimas emociojn de la parolantaj personoj, plej ofte koleron aŭ eĉ furiozon, alifoje kurtuŝon kaj teneron. Ankaŭ familiareco, humuro, mokado kaj sarkasmo estas tipaj por emocia esprimado.

Trovi milojn da tiaj esprimoj ne estas facila afero. Oni devas legi esperantlingvan literaturon kun kraĵono en la mano kaj ĉiun spritan esprimon noti. Ankaŭ mi havas milojn da tiaj notoj en mia komputilo kaj tial mi scias, kiel malfacile estas trovi inter ili tiun, kiu estas ĝuste nun bezonata. Mi ne miras, ke ne ĉiu traduko de Cink estas plej trafa kaj tial mi klopodas trovi pli trafan. Mi traserĉas mian komputilon, ofte vizitas Guglon kaj Vikipedion kaj mi ankaŭ konsultas alilingvajjn vortarojn. Mi ekzemple aĉetis ĉeĥan-hungaran vortaron por serĉi hungaran frazeologiaĵon kaj poste kontroli ĝin en la libro *6000 frazeologiaj esprimoj*. Simile mi havas vortarojn franca, germana kaj itala, por ke mi povu konsulti la vortarojn de Le Puil, Krause kaj Minnaja. Kutime helpas, kiam oni scias, kiel iun metaforon esprimas aliaj lingvoj, ĉar inter itiaj variantoj ofte aperas almenaŭ unu, kiu estas tradukebla al Esperanto sen perdo de komprenebleco kaj sen perdo de emocia forto.

Mi kredas, ke nia frazeologia libro estos utila ankaŭ por tiuj esperantistoj, kiuj ne konas la ĉeĥan lingvon. Ili povas aĉeti ĉeĥan vortaron aŭ simple legi nur la esperantlingvajjn frazeologiaĵojn kaj la ĉeĥajn ignori. Certe ili trovos tie multe pli da spritaj parolturnoj ol ĉe legado de amuza romano aŭ teatraĵo.

Fragmento el la frazeologio

J

já – *Mé druhé já*. Mia alterna mio (egoo).

Mé lepší já. Mia pli bona interno.

A co já? Kaj kio /pri/ mi?

jablíčko – *Těšínská jablíčka*. Konsolaj promesoj.

Tváře má jako jablíčka. Vangoj ruĝetaj kiel pomoj.

jablko – *Adamovo jablko* (= *ohryzek v krku*). Adama (gorĝa) pomo.

Kousnout do kyselého jablka. (metaf.) Decidi malagrablan problemon.

Jablko sváru. Pomo de Pariso (de malkonkordo). Fonto de konfronto. Kaŭzo de reciproka naŭzo.

Jablko daleko od stromu nepadne. Ne falas fruktoj malproksime de l' arbo. Bojas hundido kiel ĝi aŭdas de hundoj.

Malgrandas diferencoj inter parencoj.

jádro – *Přijít k jádru věci*. Penetri al la kerno de la afero.

Být v jádru dobrý. Esti esence bona.

V tom je jádro pudla (= *věci, problému*). En tio estas la kerno (medolo) de la fenomeno (afero, problemo). Tio do estas la tubero en la afero.

jak – *Vědět jak na to*. Koni la kielon (manieron) de io.

Vědět jak na někoho. Scii kiel trakti kun iu (iun).

Jak už to /tak/ bývá. Kiel kutimas. Kiel oni jam kutimiĝis.

Ani nevíš, jak mi bylo. Vi ne povas imagi, kiel mi sentis min.

Jak ty mně, tak já tobě. Se vi tiel, ankaŭ mi same tiel. Kiel vi al mi agas, same mi repagas. Kiel vi min kontaktas, same mi vin traktas.

jaksepatří – laŭdece, tipe, perfekte

jakž-takž – apenaŭ, iele-tiele, duone-malbone

jáma – *Jít do jámy lvové*. Iri en evidentan danĝeron. Kuraĝi en la kavon de leonoj. Mezi la kapon en leonan faŭkon.

Kdo jinému jámu kopá, sám do ní padá. Kiu fosas sub alia, falos mem en foson. Kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon. Kiu kaptilon instalas, tiu mem en ĝin falas.

jančit – frenezeti, konduti histerie

janek – *Je to ale janek*. Li (ŝi) estas ja perpleksul/in/o.

Byl jsem z toho janek. Mi estis pri tio ĉi konfuzita.

jankovatět – fariĝi perpleksa, panike obstini (konduti)

jarmark – *Jít s něčím na jarmark*. (metaf.) Iri kun io al publika forumo.

jasat – *Jásat předčasně*. Jubili (ĝojkrii) tro frue.

jasně – (metaf.) memkomprene, certe, klare-lapidare

jasno – *Udělat si v něčem jasno*. Havigi por si klaran komprenon pri io.

Z čista jasna. Neatendite fulme subite.

jasný – *Je to jasné jak facka*. Tio estas kristale klara. Tio estas evidenta por la kapo inteligenta.

Je to nad slunce jasnější. Tio estas pli ol sunklare evidenta (evidenta kiel suno firmamenta).

jazyček – *Chlupatý jazyček*. Elektema (frandema) lango (gusto).

Být jazyčkem na váze. Esti ekvilibriga langeto /de pesilo/.

jazyk (orgán v ústech) – *Spálit si jazyk.* Brogi sian langon.

Jen se to rozplývá na jazyku. Tio ĝuigas la langon (guston).

Jazyk se mu (jí) lepí na patro (= *žízňí*). Lia (ŝia) buŝo sekas, la lango palaton